

ISSN: 0827-3154

Revuo de Kanada Esperanto-Asocio

2014/2 somero/aŭtuno 2014

Mailed under Canada Post Publications Mail Sales Agreement No. 40046355 for the *Lumo*.



Feliĉan Zamenhof-feston!

Enhavo de la numero

Kolumnoj de la redaktoro	3
Novajoj de KEA	4
Invito al MeKaRo, majon 2015, Toronto (Mateo Chisholm)	5
Venontaj eventoj	6
Sinprezento de estrarano Tamara Koziej	6
Anoncoj kaj artikoloj (ĉefe pri Kanado)	8
Raportoj pri UEA	8
Raportoj pri NASK (Lottie Ericson, Ardeo Mann)	10
Raporto pri AMO-2 (Usui Hiroyuki)	12
Vizito de CO-anoj de UEA al Montrealo cele al UK en 2017 (Jenja Amis)	14
Komuna virtuala Zamenhof-festo (Mateo Chisholm)	19
Festado en Kalgario (Paul Hopkins)	20
Artikoloj, kontribuajoj kaj distraĵoj	21
Tri plenaj semajnoj en Oomoto (Jenja Amis)	21
Esperanto-kurso en Nov-Brunsvika lernejo (Bruce Arthur)	25
Aventuroj pri la dissendado de la antaŭa numero de <i>Lumo</i> (Joel Amis)	26
Recenzo de <i>La Bona Lingvo</i> de Claude Piron (Bruce Arthur)	28
Krucvortenigmo (kaj solvo de la antaŭa) (Don Reble)	29
Pliaj fotoj de la vizito de la CO-anoj al Montrealo	32

**Limdato por la venonta numero :
31an de julio 2015
Kontribuajojn oni sendu al :
greatrex@uottawa.ca**

Kolumnoj de la redaktoro

La plimulto de vi ricevos ĉi tiun numeron nur en elektronika formato. Kia revolucio en KEA! Ni forte esperas, ke neniuj ĝeniĝos pro la abrupta ŝanĝo: KEA iasence sekvas la spurojn de sia fratina asocio, ESK, kiu jam delonge tiel agas. Evidente, KEA konscias, ke iuj anoj ne havas retaliron, kaj tiujn anojn ni volonte provizos per papera versio de la revuo. Evidente, ni sendos aŭtomate paperan version al iu, kies retadreso ni ne posedas; ankaŭ al homoj, kies retpoŝtaj kesto ne sufiĉe grandas por ricevi la revuon. Ŝajnas al la estraro de KEA, ke temas pri efika maniero daŭrigi kontakton kun la legantaro (kiu cetere ricevos la numeron pli akurate) kaj malpligrandigi niajn elspezojn. Tiamaniere ni povos uzi niajn rimedojn por (ekz.) varbi pli da membroj, oni povas esperi. Evidente, ne hezitu kontakti la redaktoron por esprimi vian opinion pri la ŝanĝo. Eble iuj inter vi ĉagreniĝis pro la malfruo de la lasta numero, pro kio ni pardonpetas. Tamen ekzistas bonaj kialoj pro tio : la numero ja pretiĝis meze de julio,

dank' al la efika helpo de Steĉjo Norvell, sed kompatinda Joel Amis spertis tutan serion da problemoj pri la elsenda procezo. Vi povos legi la rimarkindan historion de la afero sube en ĉi tiu numero.

Mi gratulas al Ellen Eddy pro la solvo de la lasta krucvortenigmo; dankon al Arlyn Kerr ankaŭ pro ŝiaj solvoj. Rimarkindas, ke nur usonaninoj ensendas respondojn al nia enigmo! Ĉu neniuj kanadanoj enigmumas?! Ni prezentas novan enigmon en la jena numero. Mi danku cetere Ken Price kaj Bob Williamson pro zorga provlegado.

Kontribuajojn ni ĉiam ricevas kun plezuro. Bv. sendi viajn artikolojn, raportojn, enigmojn k.s. al la redaktoro, antaŭ la fino de julio 2015.

Retadreso : greatrex@uottawa.ca

La kovrila bildo montras kukon preparitan en Montrealo por la Zamenhofa festo.

Geoffrey Greatrex

La retejo de KEA estas la jena :

<http://esperanto.ca/eo/kea>

La lastatempe modernigita retejo de UEA troviĝas ĉi tie :

<http://www.uea.org/>

Novajoj pri KEA

Stipendioj

Estas plezuro anonci, ke Kamila Koziej-Lévêque ricevis la stipendion proponitan de KEA de 1000\$ por unuafoje partoprenontoj en IJK aŭ UK. Ŝi skribas:



Saluton, mi nomiĝas Kamila kaj estas 20 jaraĝa ino el Saguenay, kiu estas geografia regiono en la nordo de la provinco Kebekio. Tiun ĉi someron okazos mia unua partopreno en la TEJO-kongreso. Mi tre ĝojas havi tiun ŝancon, ĉar mi estas certa, ke tio estos granda pliriĉiga oportuno por mi. Mi kredas efektive, ke malgraŭ mia pli frua plezura partopreno en la Infana Kongreso en Bialistoko, la IJK-o en Wiesbadeno estos por mi nova ĉapitro en mia esperanta vivo. Mi ĵus finis miajn kolegiajn studojn kaj mi deziras vivi aventurojn en la vasta mondo. Do mi certas, ke mi ĝojos konatiĝi kaj interŝanĝi en Esperanto kun samaĝuloj el diversaj landoj. Cetere, la internacia lingvo kongruas kun miaj valoroj pro ĝia humanismo kaj malfermo, kaj mi vere fieras esti parto de tia movado. Mi plezure rakontos miajn spertojn en la venonta numero de *Lumo*!

KEA dankeme agnoskas la malavaran donacon de 500\$ de Yves Bellefeuille, kiu spronis ĉi tiun proponon de la asocio. Ni esperas daŭrigi tiajn konkursojn estontece, same kiel ni ankaŭ faris en 2014 por ebligi partoprenon en NASK.

Indas anonci ke la venonta NASK okazos de la 30a de junio ĝis la 9a de julio 2015 en la universitato William Peace, Raleigh, Norda Karolino. Detalojn oni trovos je la retejo: <http://nask.esperantic.org/venonta>

Stipendioj proponataj de KEA

KEA proponas la jenajn stipendiojn por du venontaj eventoj:

3 stipendioj de 300 \$ nur por gejunuloj (ĝis 30 jaroj) por ĉeesto de la komuna KEA-Esperanto USA kongreso en Detrojto (pri kiu vidu p.6)
2 stipendioj de 1000 \$ por anoj de KEA por partopreni NASK-on.

En ambaŭ kazoj kandidatoj bv. sendi mesaĝon, en kiu oni pravigas sian peton, al la redaktoro de *Lumo*, greatrex@uottawa.ca, antaŭ la 31a de marto. Estas rekomendinde, ke oni priskribu siajn jamajn spertojn en Esperantujo; tiuj, kiuj ricevos stipendion, devos liveri raporton al KEA, kiun oni eventuale aperigos en la revuo. La respondeculoj de la instrua fondaĵo de KEA (Ian Richmond, Allan Simon, Geoffrey Greatrex) aljuĝos la stipendiojn; KEA kompreneble bonvenigas donacojn al la fondaĵo.

Estrarkunsidoj

Indas raporti mallonge, ke la estraro de KEA ja lastatempe iom vigliĝis : okazis per Skype estrarkunsidoj en oktobro, novembro (2014), kaj nun en januaro. Ne mankas eroj en la tagordo, sed iom post iom la estraro esperas progresigi nian lingvon en la lando malgraŭ geografiaj obstakloj. Joel Amis, kiu laboras parttempe por KEA, lerte kunigas estraranojn, kiam venas la ĝusta momento por la kunsido; li ankaŭ pretigas tagordojn kaj protokolojn.

Venu al MeKaRo, Toronto, 16-18 majo 2015



Plankunsido por MeKaRo. De maldekstre: Jogo, Ken, Will, Ryan, Mateo, Tiffany, Skoto, Jeremio, Ting

La Esperanto-Rondo de Toronto invitas vin al la Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto (MeKaRo) — turisma semajnfino en amikeca etoso — de la 16a ĝis la 18a de majo 2015. Ekde 2003 MeKaRo okazas ĉiujare, alterne en Kebekio kaj en Ontario, dum la longa semajnfino en majo, t.e. la semajnfino de la Tago Nacia de la Patriotoj en Kebekio kaj de la Viktorina Tago en Ontario (krom en jaroj, kiam okazas pli granda kongreso en la regiono).

MeKaRo jam okazis en Toronto en 2005 kaj en 2009. Tridek unu homoj partoprenis ĝin en 2009; tamen, eĉ je la 19a de Januaro, 34 homoj jam aliĝis al MeKaRo 2015, do la kresko de ĉi tiu ĉiujara renkontiĝo estas kontentige daŭrigata. Iuj aliĝintoj venos el urboj tiel distancaj, kiel Vaŝingtono, Bostono kaj Seatlo.

Toronto estas la plej granda urbo de Kanado, la kvara plej granda en Nord-Ameriko, kaj hejmo al diversa loĝantaro de preskaŭ tri milionoj da homoj. Ĝi estas tutmondnivele centro de komerco, financo, arto, kaj kulturo, kaj estas plej ofte listigata inter la urboj kun la plej bonaj vivkondiĉoj en la mondo. Toronto ankaŭ estas bonege konektita al la cetero de Nord-Ameriko per diversaj transportrimedoj.



Laŭ la MeKaRa tradicio, la programo inkluzivos turismajn ekskursojn kaj komunajn manĝojn. Ni havos tutan semajnfinojn por ĉiuj — anglalingvanoj, franclingvanoj, kaj alilingvanoj — interkonatiĝi, babilante en Esperanto. Ni vizitos la torontajn insulojn, la leĝdonan asembleon de Ontario, la bierfarejon Steam Whistle kaj la fervojrotondan parkon. Jed Meltzer ĉiĉeronos promenadon tra tri interesaj komercaj kvartaloj. Sabatvespere Benĉjo Stevens koncertos kaj Sonja Lang gvidos rolludan seancon; kaj

dimanĉvespere ni daŭrigos la serion de la hantataj promenadoj, kiun oni jam spertis ĉe MeKaRo en Kingstono en 2011 kaj en Otavo en 2013.

La oficiala loĝejo por MeKaRo 2015 estas Neill-Wycik Summer Hotel. Ni intertraktis tre favorajn gruptarifojn por MeKaRo kun tiu somera hotelo, kiu funkcias kiel studenta loĝejo de septembro ĝis aprilo. Ĉiutaga kontinenta matenmanĝeto estas inkluzivita por tiuj, kiuj loĝos tie.

Pliaj detaloj pri la renkontiĝo troviĝas en ĝia retejo <http://mekaro.ca/>. Ankaŭ eblas sendi demandojn al informo@mekaro.ca. La retejo enhavas plenajn informojn pri la programo kaj pri la loĝado. Ĝi ankaŭ inkluzivas aliĝilon, do (por helpi nian scion pri kiom da partoprenontoj atendi), se vi jam certas, ke vi partoprenos, mi kuraĝigas vin aliĝi tuj.

Ĝis la revido en Toronto ĉiprintempe!

Matthew (Mateo) Chisholm
Komitatano, MeKaRo 2015

Venontaj eventoj (2015)

16 - 18 majo, MeKaRo en Toronto, vidu la tuj supran artikolon por detaloj.

26 - 29 junio, komuna kongreso (kun Esperanto-USA) en Detrojto. Vi trovos plenajn detalojn en la retejo de la usona asocio,
<http://esperanto-usa.org/en/content/komuna-kongreso-en-detroito-2015>

30 junio - 9a de julio, NASK, universitato William Peace, Raleigh, Norda Karolino (vidu pli supre, sub stipendioj). Dum la unuaj 5 tagoj de NASK okazos la **dua Kino-Teatro-Festivalo** (KTF). La Festivalo finiĝos je sabato kun la montro de filmoj kaj espereble kun la montro de novaj filmetoj, kiujn oni faris dum la Festivalo. En la mateno, oni studos Esperanton kaj posttagemeze kaj vespere oni havos la okazon lerni pri filmfarado kaj helpi fari filmeton. Bedaŭrinde la retejo de la 2015 KTF ankoraŭ ne pretas. Sed en januaro ligo aperos. La retpaĝaro de la 2014 KTF estas la jena:

<http://previous.kotofesto.server309.com/>

25 julio - 1 aŭgusto, 100a UK, Lilo (Lille), Francio. Jam aliĝis pli ol 1690 personoj (je 22a de januaro 2015), cifero, inter kiuj 16 kanadanoj. Via redaktoro ĉeestos kaj esperas renkonti plurajn legantojn tie! Vidu la retejon:

<http://www.lve-esperanto.org/lille2015/eo/index.htm>



Sinprezento de nia nova estraranino, Tamara Koziej

Mi foje diras ke mi havas du pasiojn en mia vivo kaj ili ambaŭ estas verdaj...hortikulturo kaj Esperanto ! En ambaŭ mi trovas multon da poezio. Do, mi daŭre sekvas mian verdan vojon...



Vivvojo

Mi naskiĝis en pola vilaĝo Wolka Domaszewska (tute neprononcebla, ĉu ne !?) fine de la somero 1963 dum freneza pluvŝtormo. (Rilate al tio mia patrino ĉiam diradis, ke ĝuste pro tio mi havas tiom nestabilan kaj turbulentan vivon !:-))

Jam en baza lernejo mi ŝatis lingvojn, sed mi esperantiĝis komence de mia universitata studado, kiam mi iĝis 19. Mi studis dum kelkaj monatoj

sub la afabla gvidado de mia unua esperanta instruisto, Roman Dragan. Mi tuj starigis tre fortan emocian ligan al la universala lingvo kaj mi tuj ŝatis ĝian sonon, kiel ankaŭ kernan ideon pri la homa frateco kaj bezono de la komuna neutrala lingvo.

Mi alvenis al Kanado somere de 1990 kaj min bonvenigis esperanta komunumo de Montrealo. De pli ol 20 jaroj mi loĝas kampare en sufiĉe fora regiono de la kebekia nordo, kie mi okupiĝas profesie pri ĝardenoj. Dum longaj jaroj mi estis membro de Pasporta Servo, sed pro la distanco... rare mi ricevadis gastojn.

Mi decidis studi arkitekturon pri pejzaĝo kaj daŭripovan evoluon kiam mi estis 43. Kiam mi iĝis 50, mi konstatis fulme, ke vivo mia pasas kaj mi ĉiam neglektas tion, kion mi altprezas, Esperanton ! Tiam mi decidis pli aktive esperantumi por respekti tion, kio estas kara al mi. Franca amikino, Françoise Noireau instigis min krei fejsbuk-paĝon, kiun mi titolis Espéranto-Saguenay

(<https://www.facebook.com/pages/Esp%C3%A9ranto-Saguenay/1433956080150833?fref=ts>). Vi bonvenas tie, almenaŭ unufoje por ŝati la paĝon :-). Krome mi esperas krei lokan komunumon de esperanto parolantoj kaj starigi klubon.

Ŝatoj

Mi pensas ke libera 'traduklaboreto' de la poezio estas mia plej ŝatata okupo en Esperanto. Mi ankaŭ tre ŝatas ludi per la plena vortaro (PV), malfermante ĝin je hazarda paĝo ! Kanti kaj partopreni eventojn kie oni sukcesas krei komunan, agrablan amikecan etoson estas aparte ĝuiga por mi... Mi intencas esperantigi Carmina Burana de Carl Orff kaj ankaŭ trovi taŭgajn vortojn por la muziko de Bolero de Ravel. Estus perfekte pretigi tion por la kongreso en Montrealo en 2017...ĉiukaze mi esperas !



Anoncoj kaj artikoloj (ĉefe pri Kanado)

Raporto pri UEA

Pri la membro-statistiko de UEA: la nombro por la jaro (2014) de individuaj membroj atingis 5003. La individuaj membroj, jam registritaj por 2015, nombras 2124. La 31-an de decembro pasintjare la nombro de membroj por 2013 estis 1802. Ni antaŭvidas, ke la pozitiva diferenco daŭre kreskos.

La nombro de aliĝoj al la 100-a UK atingis 1006. Almenaŭ 200 aliĝiloj ankoraŭ ne estas traktitaj kaj novaj daŭre venas. Ankoraŭ ne eblas taksu pli precize, sed la fina nombro de aliĝantoj sendube superos 2000. Pro tiaj ciferoj ni povas eniri la jaron 2015 kun firma fido pri bona estonteco de UEA. Feliĉan novan jaron al ĉiuj!

Wally du Temple (reprezentanto de KEA en la komitato de UEA)

Raportoj pri Esperanto kaj UN

Konsultu la jenan retejon, www.esperanto-un.org/informiloj por informiĝi pri la agado en Novjorko. En la novembra informilo de *Esperanto por UN* vi legos pri du grandaj elstarigoj de Esperanto en du el la plej grandaj mondaj tagĵurnaloj, Wall Street Journal kaj New York Times. Tiuj artikoloj aperis, almenaŭ en tiu formo, pro la surloka ĉeesto de membroj de nia naŭpersona laborgrupo en Novjorko. Neil Blonstein gvidis la projekton de Wall Street Journal al sukcesa kompletigo, al kiu kontribuis ankaŭ Steven Brewer. Humphrey Tonkin almenaŭ malhelpis, ke *New York Times* aperigu kriplajn mistradukojn de Esperantaj vortoj kaj frazoj en sia prezento...

Tiu surloka ĉeesto rezultas el diligenta laboro de niaj reprezentantoj, kaj ĝi ne estas senpaga. Kiam Young-Long Kim, Neil Blonstein kaj Humphrey Tonkin ĉeestis la kelktagan jarkonferencon de neregistaraj organizaĵoj ĉe UN, ili ne nur disvastigis nian mesaĝon, sed ankaŭ ... generis kostojn per sia ĉeesto. Kiel bazon, ili utiligis nian oficejon en 777 United Nations Plaza, kies monata lupago kaj telefonaj kostoj estas regulaj elspezoj dependaj de la donacoj de niaj subtenantoj – do, homoj kiel vi. La plej facila maniero sendi iun ajn sumon estas ĝiro al nia UEA-konto, novj-w.

Pri la pluraj artikoloj kaj eĉ filmoj pri Esperanto en anglalingvaj usonaj ĵurnaloj kaj retejoj, vidu:

http://online.wsj.com/articles/one-of-the-perks-of-speaking-esperanto-free-lodging-around-the-world-1415754748?mod=WSJ_LatestHeadlines (Wall Street Journal)

<http://www.wsj.com/video/a-new-york-city-tour-in-esperanto/83F5BB44-00B4-40A2-BF64-32C38E33B6E.html?KEYWORDS=esperanto+tour+of+new+york> (rondirado de Nov-Jorko en Esperanto)

Nova varbilo de UEA

Por pliefikigi la varbadon de membroj UEA aperigis novan koloran faldfolion. Vi povas konatiĝi kun ĝi ĉi tie: http://www.uea.org/pdf/UEA_varbilo_2014.pdf

La nova varbilo estas celita por distribuado en Esperanto-kluboj kaj -asocioj kaj en ĉiaspecaj Esperanto-renkontiĝoj, ĉu malgrandaj ĉu grandaj. Ĝi taŭgas tre bone ankaŭ por kunsendado kun landaj Esperanto-revuoj, klubaj bultenoj kaj aliaj gazetoj.

UEA bezonas vin!

Ĉiuj organizaĵoj bazitaj je nedeviga membreco suferas nuntempe pro la teknologia revolucio. Homoj ne plu emas ariĝi kun siaj samhobianoj aŭ saminteresuloj, ĉar diversaj specoj de tujaj kontaktoj per elektronikaj iloj estas pli rapidaj ol kio ajn ni, olduloj kaj oldulinoj, imagis dum la t.n. aktivaj jaroj de niaj vivoj. Oni eĉ ne devas forlasi komforton de varmaj hejmoj aux eĉ alivestiĝi de noktaj roboj en iun praktikan kaj elegantan vestaĵon, kaj tamen niaj amikoj ie sur la alia flanko de la Tero povas vidi senprokraste niajn vizaĵojn kaj aŭdi niajn voĉojn. Kial do registriĝi en UEA? Jen kelkaj respondoj:

- (1) Per ĉiu unuopulo kreskas prestiĝo de la asocio rilate al kvanto de la subtenantoj.
- (2) Estante eĉ nur je la plej simpla tipo de la membreco, “membro kun la gvidlibro”, (C\$ 15) vi tamen ricevos ĉiujare 100-paĝan libreton, enhavantan interesajn bazajn informojn pri ĉiu el pli ol sesdek interes-grupoj, pri ĉiuj landaj asocioj (inkluzive de iliaj adresoj), pri funkciado de la Pasporta servo, pri la E-periodaĵoj, pri la celoj de la Akademio de Esperanto kaj ĝiaj elstaraj membroj, kaj multe, multe, multe pli.
- 3) Estante membro de iu inter la pli kostaj membrokategorioj vi ricevos ĉiujare novan jarlibron (entute 368 paĝoj), kiu entenas ankaŭ la adresaron de la E-kontaktuloj en 101 landoj.
- 4) Junuloj ĝis la aĝo 29 jarojn (inkluzive) ricevos la periodaĵon *Kontakto*, en papera aŭ elektronika formo, membroj “abonantoj” ricevos monatan revuon *Esperanto*, ankaŭ lauxplaĉe en papera aŭ elektronika formo.
- 5) La aliĝo estas tre simpla: kontaktu min aŭ per kanada poŝto - mia adreso estas Olga du Temple, 765 Braemar avenuo, North Saanich BC, V8L 5G5, aŭ e-poŝte je adreso [<olgadutemple@telus.net>](mailto:olgadutemple@telus.net) kaj mi tuj sendos al vi la aliĝilon kaj informilon pri la ĉijara Universala kongreso en Lille, Francio.

Olga du Temple (ĉefperanto de UEA en Kanado)

Apero de sciencfikciaj libroj en la reto

Mi hazarde trudas al vi por prezenti tradukan eldonejon pri fantasto kaj scienca fikcio. Se vi ŝatas legi tion, bonvolu viziti. Ĉiuj sep noveloj, tradukaĵoj de majstra verkisto Jack Vance, haveblas

tute senpage ĉe <http://esperanto.us> . La distinga afero pri ĉi tiuj eLibroj (EPub, Mobi kaj PDF) estas la internaj vortaroj, kun difino ligita rekte al ĉiu malofta vorto.

Ĝan Ŭesli Starling

Raporto pri NASK en junio-julio 2014

La NASKa kurso en Viktorio allogis rekordan nombron da partoprenantoj. Ĉu ĉi tiu fenomeno okazis ĉar la universala lingvo nun iĝas pli konata dank' al la interreto? Aŭ ĉu ĉi tiu fenomeno okazis ĉar la plej bela urbo estis elektita por la kurso? Oni ne vere scias, sed mi estras tre feliĉa, ĉar Viktorio estas mia hejmbro kaj pro la proksimeco sep Esperatistoj de Insulo Vankuvero facile povis partopreni.

La lernantoj krom de Usono kaj Kanado alvenis de Meksiko, Japanio, Nederlando, Ĉinujo kaj Tajvano. Post ok tagoj da kaj amuza kaj bonpreparitaj lecionoj – jes, la tri geinstruistoj estis fabele bonaj – kaj turistemaj piedpromenadoj en buntflora urbocentro, mi certas ke la NASKanoj pakis multajn memorindajn spertojn en siajn valizojn kiam ili foriris.

La 1-a de julio estis la kanada nacia tago kun muziko sur la gazono antaŭ la parlamenta konstruaĵo. Multe da personoj, plejparte junuloj kaj fieraj kanadanoj, portis la aceran flagon dorse kiel mantelon. Je la deka nokte la festado kulminis per belega piroteknikaĵo.

La sekvan dimanĉon NASKanoj estis invititaj al tribunalcambro en la Mara Muzeo, kie juĝisto Begby, 1819-1898, prezidis. La sorto de la Pork-Milito, en la San Juano Insularo, 1859-1871, estis decidita. Vere, oni kredis, ke la bonkonata juĝisto Begby estis tie, kun blanka peruko sur kapo, klubo en mano. La scenaro estis tre amuza: Wally du Temple rolis kaj kiel enscenigisto kaj aktoro.



Posttagmeze kaj vespere partoprenantoj prezentis prelegojn kaj ĉiuj estis tre interesaj. Por mi la japana teceremonio montrita kaj klarigita de Sunjo Huĝimoto estis speciale ĉarma. Ŝi faris ĉi tiun prezenton laŭ tradicia maniero - tradicio, kiu komenciĝis en la dekdua jarcento. Unue, la gastigantino kaj la gastoj riverencis; kaj dum la ceremonio ĉiuj silentis.

Sur la tablo Sunjo, vestita en belega kimono, metis la teilojn, teskatolon, teŝutilon, tebovlon, tekirlilon (kiu similis barbopenikon) kaj ŝi



Maldekstre al dekstre: Anjo Niŝi, Lottie Ericson, Sunjo Huĝimoto kaj Mariko Nakamura, trinkante teon kanadmaniere, kun tepoto, tetaso, sukero kaj lakto libervole.

purigis la ilojn per maldika lintuko. Poste ŝi ŝutis la pulvorigitan, verdan teon el la teskatolo en la tebovlon, verŝis varman akvon, kaj kirlis ĝin ĝis ŝaŭmo vidiĝis. Al la gastoj oni proponis etajn dolĉajn biskvitetojn por neŭtraligi la iomete amaran teon, kiuj estis individue servitaj. La tebovloj estis malprofundaj, por ke neniu bruliĝu. Multe da NASKanoj provis la trinkaĵon kaj ĝuis ĝin. Teceremonio-lecionoj okazas multloke en Japanio kaj Sunjo instruas ĝin en la universitato en sia urbo.

Lottie Ericson

NASK 2014: Kiel mi pasigis mian someran ferion

NASK estis sperto tia, kian mi neniam havis antaŭe. Ĝi estis mia unua longa vojaĝo en Esperanto-Lando; ĝi estis la unua vera kurso, kiun mi faris en Esperanto; kaj ĝi estis mia unua Esperanta agado kun aliaj gejunuloj. Je la fino de NASK, mi sentis min kapabla verki, legi kaj babili, sen zorgoj pri la lingvo mem. La ok tagoj ĉe NASK estis mirindaj kaj mi dankas ĉiujn membrojn de KEA pro la stipendio, kiun mi ricevis. Tio kaj la fakto ke ĝi okazis en Viktorio, kie mi loĝas, signifis ke mi povis partopreni NASK, kvankam mi havas nur 17 jarojn kaj miaj gepatroj ne estas esperantistoj.

La unua mateno de NASK, post interparolo kun kelkaj amikoj, mi decidis studi je la supera nivelo. Dum la ok tagoj de lecionoj, mi lernis ege multe de la instruisto, István Ertl, kaj la aliaj gelernantoj. Ni parolis pri la gramatiko, ni havis konkursojn pri la kreado de vortoj, kaj ni legis artikolojn de diversaj fontoj. Vespere, ni devis verki eseojn kaj rakontojn pri temoj de 'La komenco de la mondo' al 'Kiel Obama iĝis Esperantisto'. La venontan tagon, ni laŭtlegis niajn tekstojn kaj faris korektadojn kaj sugestojn. Ni diskutis, same, la erarojn de la hieraŭaj eseoj. La lastan tagon, ni aktoris scenojn de la mallonga rakonto 'Ducent mejloj ĝis Talooska'. La supera nivelo estis iomete malfacila por mi, sed mi laboregis dum la ok tagoj de la kurso, kaj mia sciado pri Esperanto multe kreskis.

Post la tagmanĝo, kiam ni babilis pri strangaj sed interesaj aferoj esperantlingve, la prelegoj komenciĝis. La temoj estis diversaj kaj ili kreskiĝis mian sciadon pri ĉio, de voĉaktorado al tea ceremonio kaj de hiperteksto al la japana esperanta movado. Ni tradukis poemon de Emily Dickinson kaj ni eksciis pri norda Kanado. Mi lernis pli dum la prelegoj ol dum tago al la gimnazio. La ebleco lerni per Esperanto anstataŭ pri Esperanto plaĉis al mi kaj ĝi plifortigis la matenajn lecionojn.

La plej amuza kaj agrabla afero dum NASK estis, laŭ mi, la geamikoj, kiujn mi ekkonis. Kvankam mi ĝuis la aliajn esperantajn agadojn kiujn mi jam partoprenis, ĉiam mankis aliaj junuloj. Dum NASK, estis multaj aliaj gejunuloj, ĉefe el okcidenta Usono, kaj mi ne estis la plej juna. Kun miaj novaj amikoj, mi povis babili pri gravaj aferoj por junuloj, ene kaj ekstere de la Esperanta movado. De la politika situacio tra la mondo al amo, niaj konversacioj ĉiam estis interesaj. Kune, ni promenis tra la kampuso, ni kantis kaj ni ŝercis. Kiam mi pasigis tempon kun ili, mi konfirmis mian kialon por lerni Esperanton.

La lastan nokton, post vespermanĝo kun amikoj, mi iris al la diplomceremonio. Kiam mi aŭdis mian nomon kaj mi ricevis mian ateston, mi ege fieris, ĉar mi studis kaj lernis multe. Poste, ni spektis la amuzan filmon de Christopher Mihm, *La giganta araneo*. Finfine venis la tempo por adiaŭi. Mi malfeliĉis kaj preskaŭ ekploris kiam mi brakumis miajn novajn esperantajn amikojn. Sed tiel estas en Esperantujo. Oni rapide faras bonegajn amikojn sed post nelonge ili devas reiri hejmen aŭ komenci novajn aventurojn. Almenaŭ per la nuntempa teknologio, kiel Fejsbuko, ni povas babili kune trans landlimoj kaj oceanoj.

La ok tagoj de NASK, sen ajna dubo, ŝanĝis kaj mian someron kaj mian estonecon. Fakte, ĝi plibonigis mian tutan vivon. Nun, mi denove havas la pasion studi Esperanton. Mi jam pasigis tagojn post NASK, kiam mi ne devis labori, lernante pli pri la esperanta gramatiko kaj aliaj aferoj, kiujn mi ankoraŭ ne komprenas. Mi volas legi dikajn librojn kaj mi volas verki kaj esprimi min esperante.

NASK malfermis la tutan mondon por mi, kaj nun, pli ol iam, mi deziras vojaĝi tra la mondo por renkonti Esperantistojn. Venontsomere, mi havos 18 jarojn kaj mi estos diplomita de la gimnazio, do mi kapablos vojaĝi kaj esplori la mondon. Mi volas iri al Esperantaj agadoj por ekkoni novajn amikojn kaj aliajn junulojn el nia vasta mondo, kaj espereble mi revidos miajn bonegajn amikojn de NASK kiuj jam mankas al mi.

Dank' al NASK, mi kapablas paroli Esperanton sen hezitoj. Sed pli grave, mi estas vera Esperantisto nun. Mi havas bonajn amikojn el Esperantujo, mi sonĝas Esperante kaj la internacia lingvo certe estos grava en mia estonteco. Pro tio, mi dankas kaj NASK kaj KEA. Mia vivo neniam estos same kaj tio ege plaĉas al mi. Kvankam NASK estis mia unua granda esperanta sperto, ĝi certe ne estos la lasta.

Ardeo Mann

Raporto pri AMO-2 en Sidney, julio 2014

Dua AMO-seminario dementis mitojn, ek-skizis inform-strategion por vasta kontinento

La 9an kaj 10an de julio, trideko da aktivuloj el Kanado kaj Usono, plus vizitantoj el Aŭstralio, Ĉinio, Japanio kaj Tajvano, partoprenis dutagan Seminarion por Aktivula Maturigo en marborda urbeto Sidnejo (Brita Kolumbio, Kanado). La seminario traktis la temon 'Strategio kaj praktiko de Esperanto-informado en Nord-Ameriko' sub gvido de d-ro Mark Fettes, prezidanto de UEA.

En la programo estis pluraj prezentoj kaj diskutsesioj por la plena seminario, kaj diversaj laborgrupoj pri specifaj temoj, celgrupoj, kaj agmetodoj. La varia ritmo kaj enhavo de la sesioj sukcesis teni la atenton de la partoprenantoj, kaj kondukis al viglaj kaj foje profundaj interŝanĝoj de ideoj. Fine de la seminario naskiĝis kvar laborgrupoj, pri evoluigo de teknikaj rimedoj, utiligo de sociaj retoj, respondado al tiklaj demandoj, kaj la enkadrigo de la informa laboro en la pli vastaj streboj al daŭripova evoluo. Ĉiu grupo celas plukonstrui sur ideoj kaj diskutoj el la seminario por pretigi konkretajn konsilarojn kaj informrimedojn en la venontaj monatoj.

En prezento kiu malfermis la seminarion, Fettes atentigis, ke informado estas pli efika kiam ĝi tuŝas la sentojn/emociojn de la homoj. Kvankam oni ne neglektu raciajn argumentojn por Esperanto, pli prioritata estas la komunikado de kernaj valoroj – ekzemple, ke esperantistoj estas malfermitaj, inkluzivemaj, scivolemaj, kleriĝemaj, kun alta sento de persona respondeco. Li resumis esplorojn pri valororientiĝoj en Usono kaj Kanado, montrante la kompleksecon de la situacio, sed emfazante, ke kreskas konscio kaj akceptemo pri la multlingveco de la mondo. Laŭ li, la informado pri Esperanto klare metu ĝin en tiun kuntekston - do montru, ke esperantistoj mem estas multlingvaj, multspecaj homoj kiuj komprenas kaj ŝatas la homan diversecon.

En plia pensiga kontribuo, Grant Goodall dementis kelkajn ŝatatajn mitojn de nia movado. Laŭ li, la nuntempa lingvoinstruado estas grandparte sufiĉe sukcesa, almenaŭ kiam haveblas trejnitaj instruistoj, kaj la nereguleco de lingvoj ne donas tiel grandajn problemojn por la lernado, kiel esperantistoj emas imagi. Kvankam usonaj lingvoinstruistoj dividas kelkajn el niaj kritikoj pri la troregado de la angla, multaj el ili vidas simile grandan problemon en la disvastiĝo de la hispana kiel ‘dua lingvo por ĉiuj’ en usonaj lernejoj. Tiel necesas en kontaktoj kun lingvoinstruistoj emfazi nian konvinkon, ke ĉiuj lingvoj estas instruindaj kaj lernindaj. Goodall ankaŭ esprimis skeptikon pri la argumentoj pri la propedeŭtika valoro de Esperanto, kvankam li agnoskis, ke indas fari pliajn esplorojn pri ĝi.

Laborgrupo pri ĵurnalista intervjuado kondukis al plia laborgrupo pri la ‘plej tiklaj’ demandoj, kiujn oni devas foje respondi pri Esperanto. Paralele, laborgrupoj pri sociaj retoj kaj la kreado de aŭdvidaj inform-materialoj (videoj k.a.) kreis bonan bazon por posta laborgrupo pri la celgrupo ‘universitataj studentoj.’ Tiujn laborojn gvidis Mark Fettes, Humphrey Tonkin, Ĵenja Amis, Derek Roff, Chuck Mays kaj Nicholas Woods (‘Nikvo’), kun kontribuoj de multaj seminarianoj.

Kelkajn el la ideoj de Fettes esploris kaj pluevoluigis plia laborgrupo sub gvido de Tamara Anna Koziej. Dum diskuto pri kernaj valoroj, la grupo konstatis, ke necesus reрпиensi la aspekton kaj enhavon de la bazaj informiloj kaj retpaĝoj de la nordamerikaj asocioj por pli bone komuniki tiujn valorojn al ĝenerala publiko. Ekzemple, oni povus kolekti mallongajn personajn atestojn kaj rakontojn pri la kleriga kaj interpersona valoro de Esperanto, de homoj el diversaj aĝoj, regionoj, etnecoj, ktp, por vive illustri la buntecon kaj inkluzivecon de la movado. Poste la sama grupo



traktis la koncepton de daŭripova evoluo, konstatante la bezonojn de bazaj informiloj kiuj koncize kaj en simpla lingvaĵo klarigas la rilaton inter socia/ekonomia evoluo, naturo, kulturo, lingvoj kaj Esperanto.

En diskuto pri celgrupoj, evidentiĝis, ke ni ne scias sufiĉe pri la fonoj, motivoj, interesoj kaj kapabloj de la nordamerikanoj kiuj interesiĝas pri Esperanto. Tial naskiĝis projekto de enketo inter pluraj grupoj – membroj, informpetantoj, lernu-uzantoj, NASK-studentoj – por kolekti kaj analizi tiajn informojn. Kun subteno de la

estraroj de Esperanto-USA kaj Kanada E-Asocio, kaj fakaj konsiloj de Ĵenja Amis (magistra studento pri merkotiko, maldekstre), malgranda teamo realigos tiun projekton en la venontaj monatoj. Se tio montriĝos utila, oni proponos ĝin kiel modelon por aliaj landaj asocioj.

Tra la du tagoj, multaj kontribuoj estis filmitaj de Chuck Mays kaj Derek Roff, kaj daŭras kolektado kaj redaktado de la diversaj tekstoj kaj prezentoj kiuj naskiĝis antaŭ kaj dum la seminario. Tiel AMO-2 alportas pliajn riĉaĵojn al la rikolto el AMO-1. Baldaŭ pretiĝos komuna retejo por kolekti kaj disponigi tiujn diversajn materialojn.

Usui Hiroyuki

Vizito de CO-anoj de UEA al Montrealo cele al UK en 2017

Antaŭ ol la Estraro de UEA elektas urbon por la Universala Kongreso, reprezentantoj de UEA vizitas la kandidat-urbojn por inspekti potencialajn kongresejojn, hotelojn kaj vidindaĵojn, kaj ankaŭ por konatiĝi kun la loka organiza teamo. Montrealo – kandidat-urbo por la UK en 2017 – ne estis escepto : inter la 10-a kaj la 14-a de decembro 2014 la urbon vizitis la Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, Clay Magalhães, kaj la ĝenerala Sekretario kaj estrarano de UEA,



Martin Schäffer, Ĵenja kaj Joel Amis, Clay Magalhães

Martin Schäffer. Ankaŭ Orlando Raola, la prezidanto de Esperanto-USA, venis, por montri la plenan subtenon de usonaj esperantistoj por tiu komuna projekto de Esperanto-Societo Kebekia, Kanada Esperanto-Asocio kaj Esperanto-USA.

Respondeculo pri Universalaj Kongresoj jam pli ol jardekon, naskiĝinta en Brazilo, Clay neniam estis en Nord-Ameriko ĝis tiu ĉi vizito al Montrealo pro unu simpla kialo : lastfoje UK okazis en nia kontinento antaŭ pli ol 30 jaroj ! Ĝuste pro tio li ŝajne estis tre ĝoja pro la invito

de Montrealo gastigi la UK-on : finfine, jen okazo iri al Nord-Ameriko!

Ni esperis, ke Montrealo estos senneĝa dum la vizito de niaj gastoj, sed Patrino-Naturo decidis alimaniere, kaj ĝuste la tagon de la alveno de Clay kaj Martin (ambaŭ el pli varmaj lokoj) la

urbon kovris densa tavolo de la unua granda neĝfalo de la jaro. « Tio estas Nord-Ameriko, ne la Norda Poluso, eĉ se nun ĝi aspektas pli kiel la Norda Poluso », ni ŝercis elirante el la flughaveno. Ni rapide konstatis, ke anstataŭ la simbolaj ĉapeto, koltuko kaj gantoj (« por supervivi en Kanado vintre ») ni eble devintus alporti akvoimunajn botojn, la sola afero, kiu vere mankis al niaj gastoj. Sed malgraŭ la ne ĉiam-aparte-agrabla promenado pro la malseka neĝo ankoraŭ surstrate, Martin estis impresita de tio, kiom aktiva estas la urbo eĉ post la neĝo-ŝtormo kaj antaŭ ol oni forigis la neĝon, kaj Clay, ravita de la blanka magio de la urbo, plezure fotis neĝokovritajn arbojn, stratojn kaj la famajn montrealajn kurbajn ŝtuparojn.

Nia unua tago estis plene aranĝita de Montreala Turismo – la turisma oficejo de la urbo : nia fidela partnero kaj magia helpanto en tiu grandioza projekto inviti la plej grandan Esperanto-eventon al nia urbo. En la kompanio de profesia ekskursgvidantino kaj verkistino pri fajnaj manĝaĵoj, ni malkovrigis al la gastoj nian urbon.

La ĉefurbo de kisoj



Landoj – kaj urboj – ofte havas siajn logotipojn: bildon, kiu plej bone reprezentas ilin. Montrealo havas eĉ du : la oficialan (vidu apude) kaj tiun de Montreala Turismo, kiu elektis kiel simbolon... kison ! Kial kiso ? Unue, ĉar en Montrealo (kaj Kebekio ĝenerale) virinoj kisas siajn amikojn kaj amikinojn, simile al pluraj landoj de Eŭropo (kutime dufoje, sur dekstra kaj poste sur maldekstra vango), dum en aliaj kanadaj provincoj kaj en la apuda

Usono, oni ne kisas, sed brakumas amikojn. Estas ankaŭ plia kialo : se vi rigardos mapon, vi vidos, ke la insulo de Montrealo (ja Montrealo troviĝas sur granda insulo sur la rivero Sankta-Laŭrenco), kune kun la apuda insulo, similas al la du lipoj de buŝo, kiuj formiĝis por kiso.

Aŭto ? Ne ! BBMP !

Traveturante diversajn partojn de la urbo, la gvidantino atentigas nin, ke senescepte ĉiuj kvartaloj de Montrealo estas miksaĵo de privataj loĝejoj kaj komercaj ejoj : alivorte, la urbo tute ne havas pure « dormajn » kvartalojn. Malsimile al pluraj aliaj grandaj urboj, Montrealo ankaŭ ne havas danĝerajn kvartalojn kaj estas unu el la plej sekuraj urboj en Nord-Ameriko.

La plejparto de la montrealanoj loĝas je malpli ol 30-minuta veturdistanco de sia laborejo, fiere notas nia gvidantino, kaj la plej ofte maniero iri de punkto A al punkto B en la urbo estas « BBMP » : bicikle, buse, metroe kaj piede ! Multaj urboj en Nord-Ameriko estas planitaj por aŭtomobilistoj, sed Montrealo estas iom escepta : ĝin oni organizis por piedirantoj, biciklistoj kaj uzantoj de publika transporto : dum aliaj urboj de Nord-Ameriko pli kaj pli grandiĝis ĝis antaŭurboj por disponi je pli malmultekostaj terenoj kaj pli grandaj domoj, Montrealo faris la malon : oni konstruis bonan transportsistemon, kun metroo plene subtere, por ke ĝi funkciu seninterrompe en kiu ajn vetero ; oni faris biciklajn vojojn (kies kvanto grandiĝas preskaŭ

ĉiujare) kaj eĉ konstruis la tutan subteran urbon. En Montrealo oni ankaŭ severe limigas la altigon de prezoj por loĝejoj, tiel ke ĝi estas unu el la plej malmultekostaj urboj en Nord-Ameriko.

En Montrealo oni piediras kaj biciklas en kiu ajn vetero (jes, iuj frenezuloj biciklas ankaŭ vintre!), sed somere oni promenas eĉ pli, ĉar pluraj stratoj fariĝas plene piedireblaj (tute fermitaj al aŭtoj). « Plie, vi eĉ povas peti ke la urbo fermu vian straton por kelkaj horoj. Ni diru, ke vi havas naskiĝtagon kaj volas fermi straton apud via domo por festi kun viaj najbaroj kaj amikoj. Simple avertu la urbon, kaj vi eĉ ricevos du polic-aŭtojn – komence kaj fine de la strato, kaj la policistoj ĝentile avertos la aŭtantojn, ke la strato estas fermita pro kultura evento», diras nia gvidantino. Mia edzo kaj mi interŝanĝas signifoplenajn rigardojn : ĉu ni petu fermi straton speciale por ni, por novkreota montreala Esperanto-festivalo ?!

32 kilometroj subtere

La fama strato Sainte-Catherine estas, laŭ nia gvidantino, la plej granda butikuma strato en Kanado, sed la 15 km da vendejoj, kiujn oni vidas de sur la strato, estas nur la supra parto de la glacimonto, ĉar la pli granda parto de la butikoj troviĝas ne surtere, sed subtere ! « Kiam, laŭ vi, oni plej ofte iras butikumi subtere? », demandas la ekskursgvidantino. « Kiam neĝas ! » tuj respondas niaj gastoj. « Fakte, ne – kiam pluvas », ŝi korektas kun rideto : « La montrealanoj toleras neĝon (eĉ se ili foje plendas pri ĝi...), sed ili tute abomenas pluvon ». La montreala subtera urbo (oficiale, « RÉSO », homofono de la franca vorto « réseau » -- « reto ») estas plia unikaĵo de la urba planado de Montrealo kaj la plej granda subtera urbo en la mondo. 32 kilometrojn longa (duoblo de la larĝeco de la insulo !), klimatizita kaj kun natura lumo, ĝi interligas la tutan urbocentron en giganta reto de tuneloj, vendejoj, restoracioj, bankoj, stacidomoj, universitatoj, kongresejoj, biblioteko kaj, kompreneble, metroo : jen perfekta loko por perdiĝi... kaj trovi sin en iu butikoj, aĉetante novajn ŝuojn (kio ŝajne tro ofte okazas al mi!). La butikoj funkcias tra la semajno, ofte eĉ ĝis la 8-a vespere kaj ankaŭ semajnfine, pri kio Clay surpriziĝis : ja en Okcidenta Eŭropo ili ofte fermiĝas frue kaj ofte ne funkcias dimanĉe – sed ne en Nord-Ameriko !

Vivi malpli rapide

Kiam la usona kafej-ĉeno Starbuck's venis al Montrealo, ĝi devis ŝanĝi la originalan planon de kafejoj por inkluzivi pli grandajn spacojn por sidi, rakontas al ni la ĉiĉeronino : jes ja, en Montrealo oni estas malpli hastemaj ol en aliaj partoj de Nord-Ameriko kaj oni preferas trinki kafon sidante en kafejo anstataŭ rapidante sur la strato, kaj certe ne en la aŭto. Kial la vivoritmo en Montrealo estas pli malrapida ? Interalie, dank' al multaj enmigrantoj el mediteraneaj landoj, kiuj preferas malpli streĉan vivoritmon. En multaj laborejoj oni ankaŭ ĉesas labori iom pli frue en vendredo (« kaj se via ĉefo ne permesas al vi foriri frue kaj vi ne havas tro da farenda laboro, vi simple 'malsaniĝas je gripo' kaj iukaze foriras frue »).

Tie, kie vintre kuŝas neĝo, en somero estos multaj terasoj, kie oni sidos ĝis malfrunokte kafumante, manĝante kaj ĝuante bieron aŭ vinon kun geamikoj. « Laŭ la kvanto da

mikrobierejoj, Montrealo malantaŭas nur Belgion kaj Germanion », diras nia ĉiĉeronino, kiu ankaŭ gvidas manĝaj-ekskursojn, aldonante, ke ne estas eĉ unu manĝaj-revuo, kiu ne dediĉis tutan numeron al Montrealo, aparte fama pro sia kuirarto. Tamen, oni bone manĝas ne nur en multekostegaj restoracioj : eĉ apudstrata sandviĉejo, se ĝi ne faras la sandviĉojn bone, fermiĝos pro granda konkurenco. Multaj montrealaj restoracioj ankaŭ permesas, ke oni alportu sian propran vinon aŭ bieron (serĉu ŝildon « apportez votre vin ») – kio multe malgrandigas vian fakturon; oni cetere ne riproĉos la alporton de siaj propraj trinkaĵoj al tiuj lokoj.

Urbo kreema

Kreemo estas aparta trajto de la montreala karaktero : la urbo de festivaloj (somere en Montrealo okazas ĉirkaŭ naŭdeko!), muziko, modo, videoludoj, kino-arto kaj arkitekturo, Montrealo estas rafinita kombinaĵo de novaj kaj malnovaj elementoj, kiuj kunvivas en harmonio, tiel ke unu parto ne dominas la alian. Bona ekzemplo de tiu kunvivado estas la « Katedralaj Promenadoj » : tiel nomiĝas la parto de la montreala subtera urbo, kiu troviĝas tuj sub bela gotika anglikana katedralo, konstruita en la 19-a jarcento kaj daŭre funkcia. Kial ĝi estas tiom speciala ? Ĉar oni konstruis parton de la subtera urbo rekte sub ĝi ! Atentemuloj ankaŭ notas, ke la apuda altega hipermoderna konstruaĵo, en kiu respeguliĝas la preĝejo, havas gotik-formajn fenestrojn, kaj ĝia supro similas al mitro (t.e. alta dupinta kapvesto) de episkopo – omaĝe al sia najbara katedralo. (Dum la sekvaj vizitoj al eventualaj kongresejoj kaj hoteloj, Clay demandis, ŝercante, ĉu la homoj, fakte, volos vere resti en la kongresejo pro la apudaj vidindaĵoj ?!)

La Reĝa Monto

La lastan tagon ni invitis niajn gastojn al la Reĝa Monto : Mont Royal, kiu donis sian nomon al la urbo. Laŭ unu rakonto, kiam Jacques Cartier, franca esploristo de la 16-a jarcento, alvenis al la supro de la monto kaj de tie supre rigardis al la riverego, li diris, ke la vido de la monto estas vere reĝa. Mi ne scias ĉu tio veras aŭ ne, sed mi atestas, ke la vido de la monto ja estas reĝa : la blanka neĝa trankvilo de la vintro estas same bela kiel la verda abundo de la somero. 233 metrojn alta, la Reĝa Monto estas grandega parko tute meze de la urbo kaj estas ŝatata de montrealanoj en ĉiu sezono : somere por promeni, pikniki kaj bicikli, kaj vintre por skii, sketi, neĝoŝui aŭ ankaŭ simple promeni – kaj foti sciurojn en ĉiu sezono (ankaŭ Clay ne povis rezisti tiun tenton) ! Ĉar Montrealo estas insulo, sciuroj abundas en nia urbo (ili ja ne povas naĝi por eliri la insulon !), kaj ili aparte multas sur la Reĝa Monto, je granda amuziĝo de turistoj kaj novaj enmigrantoj.

38 paroj de brilantaj okuloj

Universala Kongreso estas tre ĝuiga evento, sed ĝi estas ankaŭ tre peza laboro por la loka grupo, kiu invitis la kongreson. Ĝuste pro tio, UEA estas aparte atenta pri la prepariteco de la loka teamo. La montrealaj esperantistoj tre bone impresis la gastojn kaj per sia nombro, kaj per sia aktiveco, kaj per la alta nivelo de Esperanto.

La kulmino de nia intensa programo estis la Zamenhof-festo en la Montreala Esperanto-Domo* : ŝajne, la ne tro granda domo de Normando (prezidanto de Esperanto-Societo Kebekia) kaj



Zdravka (lia edzino) speciale por tiu evento mirakle grandiĝis por bonvenigi 38 entuziasmegajn esperantistojn (kelkaj eĉ veturis el apudaj ŝtatoj de Usono por veni al la festo !) – iuj kun brilantaj okuloj kaj pretaj kunlabori por sukcesigi la eventon.

La vespero komenciĝis per diskuto pri organizado de UK. Martin klarigis, kiel oni elektas la kongres-urbon : la decidon faras la estraro (ĉi-foje, kvin personoj, ĉar la du estraranoj el la konkurantaj landoj, Kanado

kaj Koreio, sindetenos de la voĉdono). Oni konsideras multajn konkretajn faktorojn (ekzemple, kosto de la kongresejo, hoteloj, aviadil-biletoj), sed ankaŭ pli nekonkretajn faktorojn : ekzemple, kiam la kongreso lastfoje okazis en la regiono, kian efikon la kongreso povus havi sur la E-Movadon en tiu loko, ktp. Multis ankaŭ la demandoj al Clay pri kongres-organizado, ekzemple, prepara kaj dumkongresa laboroj, aŭ la kvanto da bezonataj helpantoj. Laŭ Clay la absoluta minimumo da homoj necesaj en la organiza teamo estas deko, sed ju pli multas la helpantoj, des malpli ĉiuj el ili devas labori : ja ankaŭ volontuloj volas partopreni kaj ĝui la kongreson – kaj la plejparto de la laboro estas bezonata ĝuste dum la kongreso. Ni ankaŭ lernis, ke, se la kongreso estis sufiĉe profita, al la volontuloj post la kongreso oni repagas la kongres-kotizon : jen eĉ plia instigo por helpi dumkongrese !

Post vigla babilado kaj abunda manĝo, okazis videa ponto (la unuan fojon en la historio de la kanada E-movado!) inter ses kanadaj urboj el tri provincoj : Kebekio (Montrealo), Ontario (Toronto, Otavo kaj Londono), kaj Nov-Skotio (Berviko kaj Halifakso). Joel Amis legis du subtenleterojn de gravuloj : de la montreala urbestro, Denis Coderre, kaj de federacia parlamentano Alexandre Boulerice, el la Nov-Demokratia Partio, reprezentanta la distrikton, kie troviĝas la Montreala Esperanto-Domo. Esperantistoj el aliaj provincoj estis tre feliĉaj, ke Montrealo invitas la plej grandan Esperantan eventon al Kanado, kaj ĉiu grupo esprimis sian subtenon al la montreala kandidatigo. La torontanoj estis plej multnombraj post la montrealanoj - 22 - kaj ili eĉ preparis kaj legis rezolucion por montri la subtenon al UK en Montrealo en 2017. Jes ja, la volontuloj neniel mankos, aparte ĉar al kanadanoj aliĝos ankaŭ usonaj esperantistoj ! Mi estis ĝoja vidi samideanojn de aliaj provincoj, kiujn mi ne renkontas ofte pro la vasteco de nia lando, kaj ni decidis fari videopontojn pli ofte : la organizado de la UK estos ankaŭ bona maniero ne nur konatiĝi kun esperantistoj el aliaj landoj, sed ankaŭ por pliproksimigi la esperantistojn en Nord-Ameriko !

Kiel vi povas helpi pri UK-on 2017 en Montrealo ?

- Ŝatu nian paĝon en Facebook!
facebook.com/Montrealo2017
- Helpu al ni traduki kaj plibonigi vikipediajn artikolojn pri Montrealo ! (ekz.,
<http://en.wikipedia.org/wiki/Montreal>)
- Aliĝu al nia dissendolisto de helpantoj ! (aliĝu mem al montrealo-uk-2017@googlegroups.com aŭ petu Orlandon Raola, oraola@gmail.com).
- Faru rezolucion de via loka grupo por subteni la kongreson ! (joelamis@yahoo.com)
- Proponu mem tion, kion vi ŝatus fari !
- *Kiel oni jam faris en Toronto kaj Kalgario, via klubo povus aprobi rezolucion favore al la UK (kaj informi la montrealanojn pri tio). Vidu la sekvan artikolon. Ndlr.*

Por ĝisrevidi niajn gastojn ni donacis al ili bongustajojn el Kanado, kun la nepra acersiropo, kaj du librojn : la ĵus reeldonitajn « Kristnaskajn rakontojn el franca Kanado »** kaj la jubilean libron de Esperanto-Societo Kebekio : « 30 jaroj da agado » : « Ĉar ni ja faris ion dum 30 jaroj... » modeste komentis nia nelacigebla prezidanto, Normand Fleury. La ĝisrevido estis kortuŝa. « Mia vizito al Montrealo estis neforgesebla, pro la varmeco kaj gastamo de montrealanoj », diris Clay. Li feliĉis eĉ pri la neĝo, kiu aparte beligis la montrealan sperton, kiu tiel fariĝis festeca kaj... aŭtentika !

Ne adiaŭ ... sed ĝis la revido, amikoj, en 2017 !

* Spektu la videeton pri la festo ĉe youtu.be/j27dQBc5xM4

** legu plej lastan recenzon, de *La Gazeto*, ĉe

http://www.esperanto.qc.ca/files/KR/Recenzo_La_Gazeto_2014_11.pdf aŭ vidu tiun, kiu aperis en *Lumo* 2013/2, p.24, kaj aĉetu ĉe esperanto.qc.ca aŭ ĉe via libroservo

Ĵenja Amis

Komuna virtuala Zamenhof-festo

La 13an de Decembro 2014 je 20:30 okazis telekonferenco inter Toronto, Otavo, kaj Londono (Ontario), kaj Halifakso kaj Berviko (Nova-Skotio), kaj la jarfina festo en la Montreala Esperanto-Domo (MEDO), kiu, post jardekoj, estis la lasta kunveno iam ajn en MEDO. En Montrealo ĉeestis Clay Magalhaes, Kongresa Sekretario de la Universala Esperanto-Asocio (UEA), Martin Schaeffer, Ĝenerala Sekretario de UEA, kaj Orlando Raola, Prezidanto de Esperanto-USA, kiuj vizitis Montrealon por esplorigardi ĝin kiel kandidaturbon por la 102a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos on 2017. Homoj en ses Kanadaj urboj bonege kaptis la okazon montri sian subtenon al ili!

Ĉeestis la telekonferencon 33 homoj en Montrealo, 22 en Toronto, 8 en Halifakso, 4 en Otavo, 3 en Londono, kaj 2 en Berviko, do entute 72 homoj. (Donis la originalan ideon, kiu fine kondukis al la telekonferenco, Yuri Shevchenko el Toronto. Dankon, Yuri!)

Dum la telekonferenco mi anoncis nome de la Esperanto-Rondo de Toronto, ke ni ĵus faris subtenan rezolucion por Montrealo 2017 — kandidatiĝo por la 102a Universala Kongreso. Mi ankaŭ invitis ĉiujn ses aliajn lokajn Esperanto-organizaĵojn en Kanado (t.e., Esperanto-Klubo de Insulo Vancouver, Esperanto-Londono, Esperanto-Nov-Skotio, Esperanto-Rondo de Otavo, Kalgaria Esperanto-Societo, kaj La Edmontona Esperanto-Societo) fari similajn rezoluciojn. Laŭ mia scio la Kalgaria Esperanto-Societo jam faris tion, kaj kelkaj lokaj Esperanto-organizaĵoj en Usono same faris, aŭ planas fari.

Mateo Chisholm

Festado en Kalgario

La 14-an de decembro (2014) Kalgaria Esperanto-Societo festis la Tagon de Esperanta Kulturo, ankaŭ konata kiel Zamenhof-Tago, en la hejmo de Allan kaj Meredith Simon.

Same kiel pasint-jare, la festo ekis en la sub-etaĝo antaŭ la bretoj de Libraro Ludovika kaj la festantoj povis pasigi agrablan horon de babilado super punĉo kaj manĝetaĵoj. Ĉi-foje tamen estis ankaŭ serioza programero: la prezidantino (Maria) okazigis mallongan afer-kunsidon, dum kiu Paŭlo prezentis rezolucion kiu subtenu la inviton de Universala Kongreso al Montrealo en la jaro 2017. La membroj de KES ne nur akceptis la rezolucion – unuanime! – sed ankaŭ trovis dum la solena subskribado ke inter ili estas la kasisto de la malnova Kalgaria Esperanto-Klubo (Joŝiki) kaj eksciis ke KES, kiel asocio daŭriganta KEK-on, ne estas tute senmona. Konsekvence ni do elektis Joŝiki esti kasisto de KES, por prizorgi la nove retrovitajn financajn rimedojn.



De maldekstre: Meredith Simon, Jason Donev, Milan Sveda, Yoshiki Komori

Por la dua parto de la festo, ni grimpis la grandan ŝtuparon al la salono, kie ni laŭte kantis dudekon da kantoj, Zamenhof-tagaj kaj kristnasko-festaj, kun gaja akompanado de Meredith, per piano, kaj Jason, per gitaro. La festeno finiĝis per solena kantado de la Himno, kiel kutimas ĉe kalgariaj esperantistoj.

Paul Hopkins

Artikoloj, Kontribuoj kaj Distraĵoj

Tri plenaj semajnoj en Oomoto

Ĵenja Amis

La menso foje ludas al ni strangajn trukojn : dum mia unua vizito pasintjare ni pasigis en Oomoto nur tri tagojn (kvankam ja plenplenajn !), sed tiu vizito por mi ŝajnis multe pli longa ol ĝi vere estis. Ĉi-jare, post la pli ol tri-semajna studa vizito al la Oomoto-Centro en Kameoka, ŝajnas ke la tempo forflugis tro rapide, eĉ se la programo ankaŭ ĉi-foje estis plenplena : studo en arkivoj, farado de intervjuoj, turismo, lernado, instruado, partopreno en festoj, kursoj, diservoj, spektado de tradiciaj japanaj artoj...



Te-ceremonio

La unuan semajnon ni pasigis studante en biblioteko de Oomoto — vera trezorejo, kie konserviĝas ĉiuj revuoj kaj libroj rilataj al Oomoto. Bonŝance por ni, kiuj ne parolas la japanan lingvon, multaj materialoj ekzistas en Esperanto, angla kaj kelkaj aliaj okcidentaj lingvoj (kiel redaktoro, mi ne povis ne rimarki la bonan kvaliton de la enhavo kaj lingvaĵo de la malnovaj revuoj de Oomoto!). La laborantoj de Oomoto estis ekstreme helpemaj kaj ĉiam helpis elserĉi la bezonatan materialon en arkivoj kaj diversmaniere konsilis. Por doni nur unu etan ekzemplon —

en unu doktora verko pri Oomoto ni trovis unu citaĵon, tre rilatan al la esplor-temo de mia edzo. Ni vane provis trovi ĝian originalan fonton kaj por momento ni eĉ pensis, ke la citaĵo eble ne estas ĝusta. Finfine ni komprenis, ke la citaĵo ja estas bona, sed tiu revuo, kie ĝi aperis, estas ege malnova kaj pro tio ĝi konserviĝas ne en la biblioteko, sed en la konservejo, la konstruaĵo, kiun oni ne kutime vizitas por ordinaraj esploroj kaj kie konserviĝas ne nur la plej malnovaj revuoj kaj libroj, sed ankaŭ diversaj valoraj objektoj ligitaj al la historio de Oomoto. Fakte, la konstruaĵo mem estas trezoro, konstruita speciale por esti perfekta arkivejo : ĝi ne havas fenestrojn, estas fajroimuna kaj tra la jaro restas je konstantaj temperaturo kaj humideco. Kutime oni eniras en tiun konstruaĵon nur dufoje jare por purigi kaj aerumi, sed speciale por ni oni faris escepton : oni invitis nin al la konservejo por foti nur unu paĝon de unu malnova revuo !

En la dua semajno ni faris pli ol dekon da longaj intervjuoj kun laborantoj de Oomoto (pluraj en Esperanto, kelkaj angle kaj kelkaj japane pere de lerta Esperanta interpretado fare de s-ro Okuŭaki, kiu ankaŭ diversmaniere helpis al ni dum nia restado en Oomoto). Ni estis ege ĝojaj, ke oni permesis al ni libere intervui homojn, sen antaŭe sciigi la demandojn, tiel ke la intervjuoj ĉiam estis spontanaj kaj liberaj. Tre ofte la laborantoj aldonis « tio ne estas la oficiala respondo, sed mia persona opinio », kio por ni estis aparte ĝojiga, ĉar ni volis ĝuste kompreni la personajn vidpunktojn kaj komprenojn de Oomoto-laborantoj pri la temo de la universitata esploro de mia edzo : kiel oomotanoj harmoniigas ĝiajn naciecajn kaj internaciecajn aspektojn.

Por ni, okcidentanoj, tio ne estas memevidenta, kaj por kelkaj eble eĉ aspektas iomete nekohera : ja de unu flanko Oomoto estas tre japancentra, kaj de alia — tre malfermite internacieca (pri tio atestas la interreligia agado kaj la uzado kaj subteno de Esperanto). Estis interese ekscii, ke por la plejparto de intervjuitoj tiuj du aspektoj neniel konflikta : jen bona ekzemplo de diferencoj inter okcidenta (tiel nomata kartezia) pensado kaj inkluziveca pensado de japanoj. En la japana socio oni « naskiĝas laŭ ŝintoismo » (ekzemple, oni dediĉas bebon en loka ŝinto-sanktejo), geedziĝas kristane kaj mortas laŭ budhismo; oni parolis al ni plurfoje dum nia dumonata restado en Japanio pri la japana emo alpreni, elekti kaj alproprigi certajn trajtojn de diversaj tradicioj. Kaj vere, la japanoj estas majstroj pri asimiligo kaj plibonigo, ne nur rilate al objektoj, sed ankaŭ al religioj. Kaj simile, tiuj du aspektoj de Oomoto por preskaŭ ĉiuj el niaj intervjuitoj aspektis tute naturaj kaj neniel nekoheraj.

Je la fino de ĉiu intervjuo ni starigis la samajn demandojn : « Ĉu vi pensas, ke Oomoto estas universala religio ? » kaj « Ĉu la japanaj aspektoj estas esencaj al Oomoto ? », kaj ni atingis interesan konkludon : eĉ se ĉiuj intervjuitoj konsentis, ke la esenco de la instruo de Oomoto estas universala kaj malfermita al eksterlando, tamen, la opinioj iom dividiĝis pri la formo mem : tio estas, ĉu Oomoto povus esti praktikata en malsamaj kulturaj kunteksto. Laŭ kelkaj, eĉ se la ideoj de Oomoto estas universalaj, ĝi tamen estas japana religio, bazita sur ŝintoismo, kaj ĝi devas resti tia. Laŭ aliaj, kvankam Oomoto naskiĝis en Japanio, ĝi povus esti praktikata (teorie parolante) ankaŭ ekster Japanio, kun malsamaj ritoj kaj absorbinte lokajn kulturojn kaj bazite sur aliaj liturgiaj bazoj ol ŝintoismo.



Dum diservo en Oomoto

Alian interesan malkovron ni faris trafolumante kronologie revuojn : oni povas vidi, ke la rolo de Esperanto en Oomoto ŝanĝiĝis tra la tempo : se komence (20-aj — komenco de la 30-aj jaroj) oni aktive varbis por Oomoto per Esperanto, nun Oomoto ne varbas novajn membrojn per

Esperanto : ĝi uzas Esperanton ĉefe por gajni subtenantojn kaj simpatiantojn. Ŝajnas al mi, ke Oomoto ne vere varbas eksterlandajn membrojn, ĉu per Esperanto aŭ ne : en la angla versio de la Oomoto-retejo eĉ estas skribite, ke Oomoto ne instigas aliĝon de eksterlandanoj pro kultura kaj lingva malfacileco. Mi trovis tiun vortumon iom forta kaj iusence malkuraĝiga, sed tio certe ne estis la intenco : oni ĝojas, se eksterlandanoj fariĝas oomotanoj, sed simple ĉar Oomoto estas inkluzivisma religio, tio signifas, ke aliĝo al Oomoto ne estas konsiderata necesa por la spirita evoluo de ĉiu persono. La solaj du landoj, kie Oomoto tamen varbas novajn membrojn, estas Brazilo (pro la granda japana komunumo) kaj Mongolio (pro tio, ke Onisaburo Deguĉi mem entreprenis grandan misian vojaĝon tra Mongolio) — tamen la kvanto de oomotanoj en tiuj du landoj ankaŭ estas relative malgranda.

Oomoto sufiĉe milde varbas enlande (per fojaj reklamoj en televido kaj radio, okazigo de ekspozicioj, ktp.) kaj ĉefe koncentriĝas sur la familianoj de jamaj oomotanoj por certigi, ke ili restas aktivaj en Oomoto. La kialo por ne varbi aktive eksterlandanojn estas simpla : ĉar ĉiuj bonaj religioj devenas de la sama fonto (laŭ la doktrino de « Bankjodokon »), pro tio estas pli bone, se oni praktikas sian originan religion. (Tio tamen ne povas ne starigi la demandon, kia tiu religio estu, ekzemple, por mi : ĉu kristanismo, kiun oni importis al mia origina mondoparto [Orienta Eŭropo] en la 10-a jarcento, estas mia « origina » religio ? Ĉu paganismo, kiun anstataŭis kristanismo ?..) Tiu nealtrudemo, laŭ mi, estas tre laŭdinda kaj respektinda sinteno, aparte plaĉa al mi persone kaj tute malsama ol la dogmeco de pli ol unu ĉefa monda religio, laŭ kiu tiu religio estas la sola ĝusta vojo, kaj la sola maniero atingi Dion. Fakte, kelkaj okcidentanoj fariĝis oomotanoj ĝuste pro tiu nealtruda sinteno : ekzemple, dum nia restado paro de artistoj el Usono — gesinjoroj Uribe, pasiaj pri ĉiuj japanaj artoj kaj kulturo kaj amikoj de Oomoto dum preskaŭ 40 jaroj — finfine oficiale fariĝis oomotanoj. Sed tamen, de alia flanko, la sekvo de tiu



Prezentado de Noo-dramo, unu el la praktikindaj naciaj artoj ĉe Oomoto

nealtrudema politiko (kompare kun aktiva varbado en la frua tempo, kiam Oomoto havis preskaŭ milionon da adeptoj) estas, ke la nombro de oomotanoj ne kreskas — fakte, ĝi verŝajne malkreskas, simple ĉar la japana socio ĝenerale aĝiĝas kaj malkreskas. Mi ne povis ne konstati, ke antaŭ Oomoto staros la sama granda demando, kiel antaŭ Universala Esperanto-Asocio, Japana Esperanto-Instituto kaj aliaj Esperantaj organizoj : tio estas, kiel trovi novajn kotiz-pagantajn membrojn por daŭrigi la kutimajn servojn kaj agadojn.

La trian semajnon ni partoprenis en la anglalinvga kurso pri Oomoto por alilandanoj. En nia grupo estis kelkaj kristanaj studentoj el Okcidenta Eŭropo (ĉefe Germanio), kiuj studas japanajn religiojn en Kioto dum kelkaj monatoj, kaj malnova amikino de Oomoto — esperantistino el Pollando, nun loĝanta en Anglio — Malgoŝa. Ĉiumatene dum tiu semajno ni vere vivis kaj spiris kiel oomotanoj — ni vekigis je la 5:30 kaj, kune kun oomotanoj, tremante pro malvarmo, ni purigis la templon, partoprenis en matena kaj vespera diservo kaj tage partoprenis la kurson, elstare gvidatan de s-ro Kimura kaj aliaj Oomoto-laborantoj. Ni havis la ŝancon konatiĝi ankaŭ kun aliaj oomotanoj kaj lerni pri uta-festivalo (kaj eĉ mem ĉanti utaojn), Ĉinkon-meditado, historio de Oomoto kaj Universala Homama Asocio — UHA (kaj ni eĉ inspirigis membriĝi en UHA kaj fondi la kanadan sekcion de ĝi!). La zenito de tiu ĉi kurso estis partopreno en granda Aŭtuna Festo de Oomoto en Ajabe, kun miloj da aliaj partoprenantoj, kaj eĉ la spertado de la aŭtomata skribado fare de la membroj de Tao-Juan : nova religio el Ĉinio (Tajvano) — unua religio, kun kiu Oomoto ekhavis fratecajn rilatojn antaŭ 90 jaroj. Estis tiom da partoprenantoj en la festo, ke ĉiuj multnombraj ĉambroj en la sanktejo de Ajabe estis homplenaj, kaj homoj en la neĉefa ĉambro povis nur per televido spekti la riton, kiu okazis en la ĉefa halo.

Dum nia restado ni ankaŭ kun granda ĝojo instruis Esperanton, plejparte prezentante niajn devenlandojn (Ukrainion kaj Usonon) kaj loĝlandon (Kanadon), kaj kantante Esperante, ukraine, france kaj angle. Mi ankaŭ malkovris, ke la japanoj tre ŝatas kanti kaj tre lertas pri kantado. Fakte, ĝuste en Japanio mi remalkovris tiun ĉi malnovan pasion, kiun mi ne praktikis dum tro longa tempo, kaj partoprenis la ekzercojn de la Oomoto-koruso « Ĉielo » kaj eĉ prezentis kun la korusanoj du kantojn en maljunulejo de Kameoka : Esperantlingve la alian version de « La Espero » (kiun mi mem pli ŝatas ol la oficialan Esperanto-himnon), kaj japanlingve la belan japanan tradician kanton Furusato, kies vortojn mi bone parkerigis dum la ekzercoj.

Kompreneble, restante en Oomoto ni ne nur studis kaj instruis — ni ankaŭ turismis kaj ĝuis



kafumadon, teumadon kaj babiladon kun laborantoj de Oomoto (kiel mi malkovris, estas ne nur agrable, sed ankaŭ tre utile, ĉar tie ni renkontis plurajn tre interesajn personojn kaj ankaŭ neformale lernis pri la funkciado de Oomoto).

Al nia adiaŭa festo venis pluraj laborantoj de Oomoto, korusanoj kaj la Esperanto-kursanoj, tiel ke la ĉambro estis tute plena. La bondeziroj de la partoprenintoj estis ege kortuŝaj kaj estis malfacile retenigi larmojn...

Granda aŭtuna festivalo

Forirante de Kameoka, en la trajno, mi pensis pri la ĉeno de eventoj, kiuj konatigis min kun Oomoto. Diversaj hazardaj aferoj ligiĝas unu al la alia, kaj, dum tiuj eventoj okazas, ne ĉiam eblas kompreni la kialojn kaj la sekvojn. Estas iom kiel rigardi pentraĵon de tro proksime : oni vidas detalojn, sed ne la grandan bildon. Mia konatiĝo kun Oomoto estis tia. Mi hazarde lernis Esperanton, hazarde konatiĝis kun mia edzo per Esperanto.

Kaj pasintjare s-ro Okuŭaki de la internacia fako de Oomoto hazarde eksciis pri nia restado en Kioto kaj invitis nin al Oomoto. Dum ni studis en la arkivoj kaj faris la intervjuojn, mi komprenis, ke ĉiuj ĉi eventoj ne estis hazardaj. Eble ne destino, sed ankaŭ ne hazardo. Necesis, ke mi venu ĉi tien ne nur por helpi al mia edzo pri lia esplorado, sed ankaŭ por mia persona evoluo. Mi trovis Oomoton kaj ĝian historion fascina, kaj oomotanojn sinceraj kaj bonkoraj. Mi trovis la respondojn al multaj el miaj demandoj, sed intertempe naskiĝis pli da demandoj, la respondojn al kiuj mi iam esperas trovi. Dum mia adiaŭa vorto mi diris, ke ĉiu persono, kiun mi renkontis, iomete ŝanĝis min persone en pli bonan homon, kaj tio ne estas troigo : ja ĉiuj oomotanoj, kiujn ni renkontis, montris al ni tiom da atento kaj zorgemo ! Multaj fariĝis niaj bonaj amikoj, kaj pri kelkaj mi eĉ pensas kiel pri miaj familianoj. Mi kredas, ke mi fariĝis pli bona persono pro tiu ĉi kontakto kun Oomoto-samideanoj, kaj pro tio mi estas eterne dankema !

Esperanto-kurso en Nov-Brunsvika Lernejo

Bruce Arthur

Lernejo L'Odyssée de Moncton (Nov-Brunsviko) instruis Esperanton du fojojn. Ĉi tiu lernejo ne instruis la lingvon dum la pasintaj tri jaroj, sed Esperanto ankoraŭ estas fako ĉe la lernejo, kaj ĝi eble instruiĝos iun venontan jaron.

Laŭ artikolo en *Lumo* de somero/aŭtuno 2010, la lernejo instruis Esperanto-kurson al klaso dum semestro de septembro 2009 ĝis januaro 2010, kaj al nova klaso de septembro 2010 ĝis januaro 2011. Estis grava afero al la Esperanto-movado en Kanado, ĉar estis la sola lernejo en Kanado, kiu tiam instruis la lingvon. La instruisto estis Jean Codjo.



Jean Codjo diris, ke la lernantoj sciis la lingvon sufiĉe bone post la kurso, kvankam la kurso daŭris nur unu semestron. Li diris, ke malfacilis paroligi la lernantojn ĉar ili ne sufiĉe kuraĝis, sed ili povis uzi la lingvon por komuniki retroŝte kun gejunuloj en aliaj landoj. Jean Codjo ankaŭ instruas germanan kurson en la lernejo, kaj li diras, ke lernantoj lernas Esperanton multe pli rapide ol la germanan.

Malgraŭ ĉi tiu sukceso, la kurso ne instruiĝis en sekvaj jaroj, ĉar la instruisto Jean Codjo devas instrui tiom da aliaj kursoj, ke li ne havas tempon por la Esperanto-kurso. Se la lernejo povus dungi plian instruiston por instrui kursojn, Jean Codjo povus denove instrui Esperanton, sed la lernejo ne havas sufiĉan monon.

Jean Codjo ne estas membro de KEA, sed li aktivas en UEA, kie li deĵoras je ties Afrika Komisiono kaj li redaktas interesan bultenon, *Esperanto en Afriko*.

Aventuroj pri la dissendado de la antaŭa numero de *Lumo*

Joel Amis

Mi, kiel administranto de KEA, transprenis la taskon dissendi *Lumon* ĉi-somere. La proceduro, kvankam kompleksa, ŝajnis sufiĉe klara dekomence. Tiam, tamen, mi perdiĝis en la burokratisma labirinto de Kanada Poŝto (interalie)...

La unua stumblo okazis ĉe la presejo. Mi elektis la servon de tre konata ĉenvendejo de oficejaĵoj (mi ne diros la nomon, sed ĝia logotipo estas ruĝa, kaj ĝi troviĝas ĉie tra Kanado kaj Usono). Submetinte la mendon per la interreto, estis klare al mi ke mi mendis leter-grandan formaton por la revuo. Irinte al la vendejo por ricevi la presitajn ekzemplerojn, je mia granda surprizo, oni prezentis al mi miniaturan Lumon (duono de la kutima grando)! Kvankam iel ĉarma kaj malpli peza, tiu « Lumeto » estis esence nelegebla sen lupeo... Mi klarigis, ke mi mendis tute alian formaton – sed, kompreneble, la « ĝusta persono » forestis pro malsano, do mi devis atendi ĝustigon de la problemo. Ĉirkaŭ semajno poste, oni revokis min por klarigi, ke oni nenion povas fari, ĉar mi submetis la mendon malĝuste. Mi protestis, ke la instrukcioj tute ne klaris, kaj petis ke oni refaru ĝin korekte, sen aldona pago (konsiderante ankaŭ ke temos pri regula mendo). La prezo kiun oni proponis por la ĝusta grando, tamen, estis tiom alta, ke mi rezignis pri ĉi tiu presisto kaj serĉis alian. Ĉio ĉi, evidente, malŝparigis multe da tempo.

Finfine kun la ĝust-grandaj ekzempleroj de *Lumo* enmane, mi komencis la komplikan taskon klasigi la sendaĵon laŭ la reguloj de Kanada Poŝto. Por ricevi la favoran tarifon por amassendado, necesas klasigi la kovertojn laŭ tre specifa skemo laŭ la poŝtkodoj (skemo kiu ŝanĝiĝas ĉiumonate). Kvankam temporaba kaj komplika, ĉi tiu tasko iris relative glate dank' al la detalaj klarigoj kiujn la antaŭa ekspedisto Yves Bellefeuille donis al mi. Sekve necesis trovi poŝtoŝtacion



La aŭtoro dum sia vizito al Japanio en 2013

kiu akceptas tian amassendaĵon (ne ĉiuj poŝtoŝtacioj tion akceptas). Kontrolinte la retejon de Kanada Poŝto, mi trovis tian poŝtoŝtacion ne tro malproksime de mi (grava punkto, ĉar mi ne havas aŭton, do temas pri portado de la plena kesto per la metroo). Portinte la keston tien, kaj starinte en la vico, mi eksciis de la deĵoranto ke tiu poŝtoŝtacio ne akceptas tian sendaĵon. Mi klarigis, ke la retejo indikis la malon – responde al kio la deĵorante klarigis, kun afabla pardonpeto, ke « la retejo de Kanada Poŝto ne estas ĉiam tre fidinda »! Li diris al mi, ke necesos porti la keston al la deponejo en Ville-St-Laurent – la sola deponejo, laŭ li, por tiaj sendaĵoj en la tuta insulo

Montrealo – kiu troviĝas je la alia flanko de la Montreala flughaveno kaj estas tre malfacile atingebla per publika transporto...

Ne sciante ĉu mi kredu al la deĵoranto aŭ ne (se eĉ la retejo ne estas fidinda...), mi poste telefonis al Kanada Poŝto por provi kompreni la ĝustan proceduron. Oni informis min, ke estas pliaj poŝtoŝtancoj (krom la deponejo en Ville-St-Laurent) kiuj akceptas tiajn sendaĵojn, sed oni ne plu povas plenumi la paperan formularon por trakti tian sendaĵon surloke (kiel oni antaŭe povis fari) kaj do nepre oni devas plenumi ĝin per reta programo. La reprezentanto de Kanada Poŝto provis helpi min plenumi tiun formularon, sed tio evidentiĝis esti neebla, pro tio ke mia nomo ne aperis en la konto de KEA ĉe Kanada Poŝto. Necesis do aldoni mian nomon – kion eblas fari nur per papera formularo, subskribenda de Geoffrey, la redaktoro...

Post traktado de tiuj burokrataĵoj, ŝajnis, ke finfine mi pretis sendi la aferon. Sed... momenton... VE! – jam intertempe efektiviĝis nova klasiga skemo (kiel mi diris, oni ŝanĝas ĝin ĉiumonate)! Rande je ploro, mi timis ke necesos reklasigi ĉiujn kovertojn. Feliĉe, la ŝanĝoj de la skemo ne estis grandaj, do ne necesis rearanĝi multajn kovertojn – tamen ja necesis rekontroli ĉion.

Nun, finfine, ĉio preta! Kovertoj korekte klasigitaj, formularo ĝuste plenumita, ĝusta poŝtoŝtanco bone notita (mi demandis specife al la telefonisto de Kanada Poŝto ĉu la koncerna poŝtoŝtanco certe akceptas tiajn sendaĵojn)! Do, mi denove ekiris kun la kesto (versajne la ripeta portado de tiu ĉi kesto bone efikis al miaj brakaj muskoloj – sed mia dorso ne tre kontentis, aliflanke!), ĉi-foje plena je la ĝoja penso ke mi finfine seniĝos je tiu kesto kaj la membroj finfine ricevos *Lumon*. Mi eniris la poŝtoŝtancojn, kaj prezentis la sendaĵon kaj formularon al la deĵoranto, memfide klarigante ke temas pri amassendo de periodaĵo. Ŝi skuis la kapon kaj diris, « Ni ne povas akcepti tion ĉi tie! Necesas porti ĝin al la deponejo en Ville-St-Laurent ! ». Min subite plenis sento de senkredo, paniko kaj senespero – ĉiuj miksitaj. « Sed, la retejo... kaj la reprezentanto de Kanada Poŝto diris al mi, ke ĉi tiu poŝtoŝtanco devas akcepti tiajn sendaĵojn! », mi diris, malfacile kaŝante la senton de malespero en mia voĉo. « Estas malĝusta informo, evidente – mi nenion scias pri tiaj sendaĵoj! », ŝi respondis, evidente esperante ke mi akceptos ian klarigon kaj foriros. Feliĉe, alia deĵoranto spektis la scenon kaj, vidante mian konfuzon kaj nekomprenon, decidis tamen kontroli la sistemon por certigi, ke oni vere ne povas akcepti tiajn sendaĵojn en tiu filio. Post kelkaj minutoj da serĉado en la komputila sistemo li deklaris, « Nu, laŭ la reguloj ni ja povas akcepti tian sendaĵon » -- je la « granda ĝojo » de lia koleginino, kiu evidente ne ŝatis, ke kliento korektis ŝin. Ne mem sciante la ĝustan proceduron, li sekvis la instrukciojn laŭpaŝe por akcepti la sendaĵon – dum kiu tempo lia koleginino daŭre mallaŭte grumbladis « Mi nenion scias pri tio... oni ne devus akcepti tion... oni neniam informas nin pri io ajn... ». La grumblulino finfine proponis, penante pravigi sin, ke « eble temas pri nova regulo... sed neniu diris ion al mi pri tio! ».

Do, resume, Lumo tre malfruiĝis! Mi tre pardonpetas pri tio... Bona afero estas, tamen, ke nun mi komprenas kiel navigi tra la labirinto de Kanada Poŝto!



La Bona Lingvo. Claude Piron. Vieno: Internacia Esperanto-Muzeo, 1997. 3-901752-11-7. Broŝurita, 109 paĝoj.

Tra la jaroj mi legis kelkajn artikolojn de Claude Piron kaj ĉiuj estis tre bonaj. Ĉi tiun jaron, mi finfine mendis lian libron *La Bona Lingvo*. La libro estas iom malpli bona ol mi esperis, sed ĝi nepre estas leginda libro.

La libro temas pri Esperanto kaj la pensoj de Claude Piron pri tio. Li ja opinias ke Esperanto estas bona lingvo – morale bona, psikologie bona, helpema, bela.

Plej interesaj estas liaj ideoj pri psikologio kaj natureco. Kiam oni unue enkondukis Esperanton, multaj homoj kontraŭis ĝin, dirante ke ĝi estas artefarita kaj malnatura. Iuj opiniis ke Esperanto estus pli bona se ĝi prenis vortojn el aliaj, « naturaj » lingvoj anstataŭ konstrui vortojn per radikoj kun-metitaj. Sed Claude Piron rigardas ĉi tiun aferon el alia vidpunkto. Li diras ke la sistemo de Esperanto estas pli natura ĉar ĝi bone respegulas la funkcionmanieron de la cerbo. Tiel, lerni kaj uzi Esperanton postulas malpli da mensa energio. Pli facilas dedukti la signifon de kunmetita vorto ol memori apartan radikon. Kaj pli facilas sekvi regulojn kiam ne estas multaj esceptoj.

Granda parto de la libro temas pri du emoj en Esperanto. Ne temas pri du grupoj de homoj – ĉiuj homoj havas la du emojn, kvankam iuj havas unu emon pli ol la alian. Ofte homoj emas uzi multajn malsamajn radikojn. Sed la mala emo estas uzi multajn kunmetitajn vortojn tiel, ke oni bezonas malpli multajn radikojn. Claude Piron subtenas la duan emon. Pri tio mi sam-opinias. Kunmetitaj vortoj estas pli facile lerneblaj, precipe por tiuj, kiuj ne parolas eŭropan lingvon. Claude Piron diras ke la dua emo plifortiĝas kaj ke oni plej ofte trovas ĝin en « reala Esperanto », tio estas, en la lingvo kiun parolas ordinaraĵoj esperantistoj.

La uzado de pli multaj radikoj pli oftas inter tiuj kiuj verkas literaturaĵojn. Iuj eĉ evitas la vorteron mal-, kaj pro tio ili devas krei novajn vortojn por esprimi ideojn kiel ‘malĝoja’ aŭ ‘malgranda’. Mi neniam komprenis, kiam verkisto volus uzi novan vorton aŭ vorton malmulte konata, kie tiu povus uzi facile kompreneblan vorton. Kiel diras Claude Piron, literaturaĵo estas malpli ĝuebla se oni devas halti por serĉi vorton en vortaro. Li opinias ke bona literaturo verkiĝu per lingvaĵo simila al la « reala Esperanto », eble iom pli bela kaj kreiva sed ne kun pli multaj radikoj.

En *La Bona Lingvo* Claude Piron verkas pri Esperanto por ĉiutaga uzo kaj por literaturo. Li eĉ verkas kelkajn paĝojn pri tradukado de poemoj al Esperanto. Literaturo ne tre multe interesas min, sed mi opinias ke gravas ke Esperanto funkcias bone por ĉiutaga uzo. Mi ankaŭ opinias ke gravas ke Esperanto estu uzebla por faka uzo, sed pri tio Claude Piron diras malmulte. Li plendas iom, ke fakaj vortoj ofte preniĝas el la greka. Ekzemplo estas la vorto teologo. Jen greka vorto kiu estas kunmetita de grekaj radikoj. Kial ne konstrui vorton per Esperantaj radikoj? Eĉ pli bone, la greka radiko teo konfuzas, ĉar ĝi samas al Esperanta vorto de malsama signifo – teologo ja studas Dion, ne teon!

Por fini, mi diras denove, ke mi trovis ĉi tiun libron bona. Ĝi estas interesa kun multaj pripensindaj ideoj.

Bruce Arthur

Krucvortenigmo

Don Reble

1	2	3	4	5		6	7	8	9	10		11	12	13	14	15
16						17						18				
19						20						21				
22						23						24				
25						26						27				
28	29	30	31	32		33	34	35	36	37		38	39	40	41	42
43						44						45				
46						47						48				
49						50						51				
52						53						54				
55	56	57	58	59		60	61	62	63	64		65	66	67	68	69
70						71						72				
73						74						75				
76						77						78				
79						80						81				

La difinoj troviĝas sube:

Dekstren:

- 1 spaco inter muroj (r)
6 rapidigilo por ĉevaloj

- 11 malfortika pro malnoveco (r)
16 estu sama kiel io
17 pretigi manĝon
18 ekposedi

19 ĉesos faradon
 20 sin ĵeti antaŭen (r)
 21 movis ion turnante ĝin ĉirkaŭ ĝia akso
 22 malalta muro staranta sub tegmento
 23 mineralo diafana uzata en juvelarto
 24 long-orela ekvo
 25 sensoj gratendaj ĉe haŭto
 26 leĝaroj
 27 uzis cigaron
 28 de praktika penso
 33 legomo de keĉupo(r)
 38 trinkvazo
 43 impresio de belarta verko (r)
 44 perdo vortkapablo (r)
 45 venena reptilo (r)
 46 priskribo de unu vidpunkto (r)
 47 alineo de poemo (r)
 48 aktive inkline
 49 scenaron
 50 granda dezerta planto
 51 teksaĵoj el kotono aŭ lino
 52 longa, maldika lignopeco (r)
 53 politikan kuniĝon
 54 entenilojn
 55 estas minacata de kuriero
 60 reprodukta parto de planto
 65 kriplaj pro dorsa maso
 70 sportema homo (r)
 71 senbara (r)
 72 agu kiel alia persono
 73 malkonfuza
 74 restu ĝis okazo (r)
 75 longkuran anuron
 76 admirigantan
 77 kaverneto
 78 antaŭmorte suferi (r)
 79 ja potenca nacio
 80 gutetojn sur herbo
 81 primata besto

Suben:

1 plej gravaj
 2 malkvietigu animon
 3 brakvesto (r)
 4 peza, malmola peco
 5 oftaj gentanoj de Sovetio
 6 glitiloj sur neĝo
 7 pelu fluidaĵon per aparato
 8 refunkciigi (r)
 9 aŭd-organo
 10 du-kapaj najloj
 11 larĝbaza botelo (r)
 12 diru kulpige
 13 neceso por elekti el du alternativoj (r)
 14 eligi flavan likvon
 15 ŝmace montros amon
 28 imagas ion forte dezirantan
 29 ŝajnigi ion per nenatura maniero (r)
 30 malduba
 31 krucan literon
 32 etendiĝi ĝis io (r)
 33 difinu farenaĵon al iu
 34 multfoje okazantan
 35 meti distingaĵon sur
 36 nitrogeno
 37 Ĉina ciklono (r)
 38 deĵore observu
 39 malliberigiloj
 40 vicigo por nomvokado
 41 kvantoj de mono
 42 valoregajn
 55 esprimu koleron per blasfemaj vortoj
 56 maparo (r)
 57 prembutono por litero aŭ tono
 58 enspirkapablan
 59 elemento de bronzo kaj luto
 60 treme brili (r)
 61 kuba decimetro
 62 sekvos ies volon
 63 enspezo de proprietulo
 64 fariga esprimo (r)
 65 transpagas tra kontoj
 66 fari bildon en la menso
 67 matematika dutermo (r)
 68 fort-manko de organo (r)
 69 plej lumoplena monato

Solvo al Krucvorteigmo, *Lumo*, 2014/1 vintro/printempo 2014

s	u	p	e	r	f	o	r	t	o	n	t	a	j	n
u			t	e	o				f	e	r			e
p		m	a	g	n	e	t	o	s	k	o	p		k
e	j	o			t				e			a	ĝ	o
r	u	b		b	u	k	a	n	t	a		t	u	n
b	r	i	t	a			n			t	i	r	u	s
o		l		l		t	a	s		r		i		e
r		i		z	o	r	g	e	m	e		o		k
d		z		a		u	r	s		p		t		v
i	d	i	o	m			a			s	p	i	t	e
ĝ	i	n		a	s	i	m	i	l	i		s	i	n
a	r	t			v				i			m	a	c
n		a	d	m	i	r	a	n	t	i	n	o		a
t			i	e	s				r	e	e			j
a	ŭ	t	o	m	a	t	i	g	o	n	t	o	j	n

Pliaj fotoj de la vizito de la CO-anoj al Montrealo, decembron 2014

La ĉeestantaro en la Montreala Esperanto-domo



Tarama Koziej salutas aliajn perrete en Montrealo